


CERBE kaj KORE



70!

**KULTURA SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 105**

N-RO 9 (77), JULIO 2019

La 7-an de Julio 2019

*elstara rusia esperantisto – instruisto, movada organizanto,
poeto, bardo, verkisto, tradukisto, historiisto, publicisto –*

Mikaelo Bronŝtejn (Bruna Ŝtono)

*fariĝas 70-jaraĝa. Tiu ĉi numero de “Cerbe kaj kore” estas
plene dediĉita al li kaj lia kreado.*

Enhavo

Omaĝe al jubileo de M. Bronŝtejn

(Versaj gratuloj de Olda Koboldo, Klara Ilutoviĉ,
Espopore, Nikolao Neĉajev, Vladimir Samodaj,
Irina Gonĉarova, proza gratulo de Boris Kolker) 3

Aŭtobiografio de Mikaelo Bronŝtejn 8

Originala poezio de Mikaelo Bronŝtejn. Poemoj diverstempaj 11

Originala prozo de Mikaelo Bronŝtejn. La pafo de moruso 37

Poezio, tradukita de Mikaelo Bronŝtejn

El la ukraina (Stepan Rudanskij, Taras Ŝevĉenko,
Ivan Franko, Volodimir Sosjura) 41

El la rusa (Osip Mandelŝtam, Iosif Brodskij, Robert 44

Roĵdestvenskij, Leonid Martynov, Samuil Marŝak, David
Samojlov) 45

El la jida (“En geto”, “Hej, klezmeroj”) 50

El la angla (V. Ŝekspiro) 51

M. Bronŝtejn. Mia bibliografio (nur libroj) 52

Enhavo de registritaj diskoj 57



Omaĝe al jubileo de M. Bronŝtejn

Bronŝtejn estas nia ĉio!
Kun akompan' de la gitar'
La tuta nia historio
Videblas en la plena klar'.

De l' sort' de brava kapitano
Ĝis morna Goblinska real'
La vasta verda panoramo
Aperas en la glor' kaj fal'.


Kondiĉoj novaj kaŭzas perdojn,
Sed malgraŭ fremda fia vol'
En la ĝardeno nia verda
Plu ĝojas nigra la popol'.

Sidante en fotela sino
Vojaĝas ni sen ajna viz'
De la infer' de norda mino
Ĝis la pariza paradiz'.

Ne estas ja obstakloj veraj
Por lia poezia fort':
Al Puŝkin, Brodskij kaj ceteraj
Jam trafas Esperanta vort'.



Erato benu lin kaj Klio,
Prosperu kaj verkadu li!
Bronŝtejn estas nia ĉio...
Kaj kion eblas diri pli?




Olda Koboldo

Via nomo alvoke plu gravas
Por tutmonda esperantistar'.
Vi dekhoman viklecon ja havas –
Iu diris pri vi sen erar'.

Via nefebliĝanta kreado
Brilu je l' admirinda liber',
En impon' de la lingvoportado
Kaj ĝojig' de la lingva prosper'.

Gardu plu vian vivon la sano,
Kiel la plej fidela amik',
Por legemo de samideano,
Por versaĵo, roman' kaj muzik'.



Per la vorto flamiĝ de korvibroj
En beleg' de la lingva medi'
Viaj kantoj, prelegoj kaj libroj
Verŝu lumon al Esperanti'!

Je la kontraŭkonflikta rezisto
Vivu sen estingiĝ' kaj forges'
Koraj vortoj de l' Esperantisto
En la lingvo de l' pac' kaj progres'!

Klara Ilutovič



Ni ĉi-vespere kantojn drinku, kiel brandon.
La bardo, plej honestas ĉi teran', do.
Por ardo bezonatas nur gitar' kaj barbo;
Verŝiĝos veraj versoj. Mia barb' por vet' !
Plu povos trovi rimojn vi en stela polvo,
La vivo estos kvazaŭ de Kolumbo ovo,
Inspiron portos ajna ventoblovo,
Ĉar sepdek jaroj estas infanaĝo por poet'.

Espopore

Bruna Ŝtono jubileas

*"Venis printempo drola,
Fajna, fragila, fola,
Brila, beata, bela,
Pranca, priamparola."
M. Bronshtejn*

Nun Ŝtono Bruna
Kaj primavero
Por Verda Gento
Priamparolas.

En tago suna,
Ĉe ĝoja kvero,
Ĉe blua vento
Li bardon rolas.

Li ĉiam kreas
Sub verda flago,
Dum tempo nuna
En slango pepa.



Li jubileas
En tiu tago.
Li estas juna
En deko sepa.

Nikolao Neĉajev

Vivu longe, Mikaelo

Sur la Tero, sub Ĉielo
Vivas-loĝas Mikaelo,
Mikaelo Bruna Ŝtono,
De l'verkado Ĉampiono.



Vivas li jam sepdek jarojn,
Faras multajn bonajn farojn,
Poemarojn li komponas
Kaj romanojn li eldonas,

Verkas multe, eĉ abunde,
Emocie kaj profunde,
Elokvente vortojn plektas,
Rimojn belajn ne neglektas,

Por poemoj kun efiko
Jen eksonas la muziko,
Kun gitar' li kantas brile
Siajn kantojn proprastile.

Kiulingve sonas kanto?
Certe ja – en Esperanto!
Jen lernantojn li edukas,
Libron bonan jen tradukas

Poezie, ankaŭ proze,
Ŝerce, gaje, serioze.
Ĉion kreas Mikaelo
En plej alta art-nivelo.

Ĉion povas, ĉion faras
Kaj pro tio al ni karas.
Nomi ĉion ex ne eblas,
(Ĉar memoro mia feblas).

Estas li amiko bona,
Kaj bonkora, kaj sindona,

Konas lin la tuta mondo,
Sed ne nur la kluba rondo.

Diverslande li koncertas
Kaj vojaĝi multe spertas,
Bardo fama, eminenta,
De 1^a homaro ĉxiugenta
Estimata, aplaŭdata
Kun sincer' amike-frata.

Sepdek jaroj? Bagatelo!
Sci tion Mikaelo!
Al mi kredu, knabĉjo, ĉar
Mi ja havas okdek kvar.

Jenas mia nun propono:
Vivu longe, Bruna Ŝtono,
Vivu sane kaj senlace
Verku plu – por ni donace!

Vladimir Samodaj

Dankletero pro APERo al Bruna Ŝtono

Kara, printempo venos, ne dubu multe!
Ree ekkantos birdoj, disfloros tero.
Ree ekfartos ni en la mond' gemute —
Helpos al ni memoro pri la APERo!

Estas apero via por ni premio
Pro niaj penoj multaj kaj araj faroj.
Ni vin atendis, Miŝa, ĉar plu nenio
Povus riĉigi tiom la amikaron.

Viaj rakontoj brilaj kaj viaj kantoj
Grave klerigis nian laikan rondon.
Samideanoj kreskas el parolantoj,
Iros cert-paŝe ili en Verdand Mondon.

Do,
Firme ni marŝu laŭ la difinita vojo.
Fartu plej bone por nia komuna ĝojo!

Irina Gonĉarova

Post APERo-6, 16-18.03.2012, Jerŝovo



Mamuto@rambler.ru – el ĉi adreso
Iniciatoj venas aktualaj.
Konstante per ideoj nebanalaj
Aspiras Miĉjo al movad-sukceso.

Esperantistoj, pacaj aŭ skandalaj,
Lin amas absolute kaj sincere.
Okazas, ke konstatas ni: ja vere
Barbuloj ofte ŝajnas idealaj...

Rimante aŭ prozante, li leĝere
Oscilas inter farso kaj balado.
Ne ŝatas li sur sia vivopado
Ŝajnigojn, flatojn – vivas li libere!



Tiĥvina klub', oazo de l' movado
En Nord-Rusio, strebas al progreso.
Jen bondezir': por nia intereso
Nur ĝoje fartu – eĉ en ĉokolado!

Viktor Aroloviĉ

aperis en la libro de Mikaelo Bronŝtejn "Lecionoj por knabo" (2009), p. 5

Mikaelo Bronŝtejn malkovris Amerikon!

Kara Mikaelo, mondvojaĝanto! Vi vizitis sennombran kvanton de landoj, esperantumante, koncertante kaj ĝuante la vivon.

Mi volas memori al vi kaj mallonge konigi al aliaj, kiel vi malkovris Amerikon. Tio okazis en marto 2006. Vi venis en Novjorkon, kie vin akceptis esperantistoj, kaj de tie vi flugis al Cleveland, ĉe la suda bordo de lago Erie.

Mi renkontis vin en la flughaveno. Vi venis kun gitaro, prunteprenita en Novjorko. Ni ekveturis per surtera metroo. Kaj poste mi veturigis vin per aŭto al nia hejmo.



Baldaŭ alvenis al nia hejmo du aŭtoj kun esperantistoj el Columbus, ĉefurbo de nia subŝtato Ohio. Mia edzino Esther preparis bongustan tagmanĝon, do nia renkontiĝo pasis ĉefe ĉirkaŭ manĝotablo. Poste vi kantis. La gastoj ĝuis vian koncerteton kaj plezure aĉetis viajn librojn.

Sekvatage ni vizitis koncerton de koruso, en kiu kantis Esther. La koncerto okazis en tiel nomata “infanĝardeno” por aĝuloj, kiun vizitas enmigrintoj el la eksa Sovet-Unio. Vi havis eblon komunikiĝi kun ili.



Poste vi koncertis en nia domaro, kie loĝas aĝuloj. Vi kantis ruslingve kaj Esperante. Ĉiuj estis ege kontentaj. La estraro de la domaro eĉ donis al vi negrandan honoraron en malmola valuto.

En la tria tago mi veturigis vin per aŭto en la urbocentron, ekskursante al multaj interesaj lokoj. La plej memorinda estis vizito al la unika kaj mondfama Muzeo de rokmuziko, en kiu mi fotis vin.

De tie ni veturis por prifesti naskiĝtagon de nia bofilo Ilja kaj lia fratino Alla. Kunvenis tre granda kompanio de parencoj kaj amikoj ĉe la tabloj kun bongustegaj manĝaĵoj kaj drinkaĵoj. Ankaŭ tie vi iom kantis.

Matene ni ellitighis tre frue, kaj mi veturigis vin al la interurba aŭtobusa stacio. Baldaŭ vi enaŭtobusiĝis kaj veturis al Ĉicago, kie vin akceptis esperantistoj. Kaj poste denove en Novjorkon, daŭrigante konatiĝon kun Ameriko en varma kompanio de esperantistoj.

Kara Mikaelo! En la tago de via 70-jara jubileo mi deziras al vi longan vivon en bona sano, pliajn vojaĝojn kaj vivoĝuon.

Boris Kolker, kiu konas vin ekde SEJT-9 en la jaro 1967.

Aŭtobiografio de Mikaelo Bronŝtejn



Mi estas Mikaelo (Moissej) Bronŝtejn, 70 jarojn aĝa provincano. Mi naskiĝis en Ukrainio, kio estis ne tro grava en la jaro de mia naskiĝo. Ekde 1968 mi konstante loĝas en Rusio. Nuntempe tio gravas, ĉar evidentiĝis, ke mi loĝas eksterlande.

Dokumentite mi havas unu edzinon, unu filon kaj unu nepinon, aperintajn en mia vivo konsekvence – 1971, 1976, 2015. Krom tiu viva posedaĵo mi havas malvivan – apartamenton en Tiĥvin, 200 km. for de Sankt-Petburgo kaj ĝardeneton kun dometo kaj ŝvitbanejo dek kvin kilometrojn for de la apartamento.



Mi diplomiĝis kiel inĝeniero pri mineja elektro kaj kiel ĵurnalisto. Tiuj profesioj nutris min en diversaj periodoj de mia vivo. Nuntempe ekster Esperantujo mi estas malinteresa vicdirektoro de negranda arbarprizorga kaj domkonstrua firmao. Tiu malinteresa okupo tamen estas salajrata.

Zamenhofeco de mia naskiĝloko – kelketna urbeto – postulis, ke mi estu denaska poligloto; mi ekparolis tuj en tri miaj hejmlingvoj: la jida, la rusa kaj la ukraina. Knabaĝe, en 1962, mi akceptis Esperanton kiel kvaran hejmlingvon, kaj ekde tiam mia vivo grandparte pasas en la esperantlingva medio. Pro tio mi estas senlime dankema

al mia karmemora Instruisto Andreo Rogov.

Bonŝance, en 1965 estis fondita SEJM, Sovetia Esperantista Junulara Movado, la rava komunumo, kiu provizis kreaŭn inspiron al konsiderinda aro de gejunuloj. Ankaŭ al mi. Kiel rezulto de tiu inspiro aperis miaj unuaj kantoj kaj poemetoj en Esperanto. Kredinde, sen tiu SEJM-inspiro mi restus daŭre kun la ruslingvaj rimoj, plektataj en mia cerbo ekde kvin-aŭ-sesjara aĝo. Cetere, la ruslingva rimado ne estis definitive forlasita; eldoniĝis en la rusa du originalaj



poemaroj, favore akceptitaj de la poeziŝatantoj. Tamen ja en Esperanto – ses... Ĉirkaŭ ducent miajn poemojn mi



Andreo Rogov, 1973

transformis en kantojn, elmurmurante simplajn melodiojn. Restis amaso da nekantitaj sed tute taŭgaj por tio – ilin uzis Ĵomart kaj Nataŝa, Elena Puĥova, Asorti kaj aliaj muzikistoj, kies melodioj, kompreneble, estas alispecaj kaj multe pli altkvalitaj ol miaj. Per tio miaj poemoj gajnas plian belsonon.

La tradukarto interesas min. Trafosinte konsiderindan porcion da diverslingvaj teoriaj studoj, mi trovis, ke io taŭgas por Esperanto-tradukado, sed io – absolute ne. Endis serĉi konvenajn praktikajn solvojn, kaj tion mi faras,

pli-malpli sukcese esperantigante poezion kaj prozon, verkitan en ĉiuj miaj hejmlingvoj. Puŝkin, Brodskij, Ivan Franko, fratoj Strugackij, Sergej Lukjanenko, Mordeĥaj Gebirtig... Aparte interesa tasko estas traduko el Esperanto aŭ per Esperanto en la rusan, do mi rusigis multajn verkojn de elstaraj esperantaj poetoj kaj eĉ kvindekda himnoj por la korea ŝonbulista templo en Moskvo. Estus malracie avari pri la akumulita sperto. Organizinte studion pri la tradukarto Esperanta, mi



La patro. 1976

ofertis la sperton al miaj lernantoj en Tihvin. Ankaŭ al kelkdeko de diverslandaj interesigantoj dum la seminarioj en multaj E-aranĝoj.

“La plum’ al kruda proz’ inklinas...” – diris Puŝkin, atinginte tridekjaran aĝon. Dek jarojn pli aĝa ankaŭ mi venis al simila matureco kaj sidkapablo. Poemon naskas kurta impulso de la inspiro. Prozverkado estas dolora, ŝvitiga, pena, longtempa, ofte eĉ enua laboro, kaj mi ne tuj kutimiĝis fari ĝin. Sed la prozverkoj estas pli aktive legataj ol la poeziaĵoj, do mi devis kutimiĝi – pro praktikaj konsideroj, ĉu ne? Nun mi produktas firman prozon. Du porinfanaj fabellibro. Novelaro. Kvar romanoj. Pluraj noveloj, publikigitaj en “La Kancerkliniko”, “Beletra Almanako”, “Scienco kaj Kulturo” ... Kelkaj premioj ricevitaj. Dank’ al la tradukistoj, kiuj opinias ion-tion el Esperanto-prozo taŭga por lego ankaŭ de neeserantista publiko, miaj prozaĵoj aperis en la angla, franca, itala, japana, korea, rusa kaj sveda lingvoj.

En 1991 por la unua fojo mi vizitis la Okcidenteŭropan landon, Francion, kaj en la Kultura Festivalo, en Parizo, prezentis tri aŭ kvar miajn kantojn. La francoj opiniis, ke mi estas filo de Trockij. Misopinio, certe, sed, eble, dank’ al tiu mi ricevis inviton turnei, t.e. koncerti kaj prelegi en la lando. La unua turneo do okazis en Francio kun dudeko da urboj vizititaj. La starta fameto kaŭzis invitojn al aliaj landoj, kaj dum pli ol dudek kvin jaroj, anstataŭ sunbrunigi la ventron ĉe iu suda marbordo, mi uzis miajn feriojn por prelegvojaĝi. Restis tri aŭ kvar eŭropaj landoj, kie oni ne aŭdis min, sed kompanse estas alikontinentaj (Koreio, Turkio, Usono), kie ja mi estis aŭdita.

La amasaj E-aranĝoj aparte logas min pro la eblecoj komunikiĝi kun la geomikoj enlandaj kaj alilandaj. Mi direktis la organizon de kelkaj amasaj E-renkontiĝoj en Tihvin, kaj, kune kun la kluba organiza teamo, mi fieras pri la rezulto, ĉar ĉiu el la averaĝaj 100-150 partoprenantoj restis kontenta. Dum mia vivo mi partoprenis en dek du Universalaj Kongresoj, foje pli, foje malpli aktive kunlaborinte en la programo. Ne maltrotaksante la rolon de UK-oj, mi nun (eble, pro la aĝo) preferas t.n. “ĉambrajn” aranĝojn kun 100 – 300 partoprenantoj, kiel ekz. Baltaj E-tagoj, Internaciaj Festivaloj en Germanio, Arkones en Pollando, Interfest en Kroatio, naciaj kongresoj en Israelo, Italio, Svedio k.a. Iom post iom mi ĉesas partopreni ankaŭ en tiuj por koncentriĝi kaj finfari ĉion planitan por kelkaj restintaj jaroj de mia longa vivo.



La avo

Mikaelo Bronŝtejn, Tihvin, Rusio

Originala poezio de Mikaelo Bronŝtejn

Poemoj diverstempaj



* * *

Estas du aferoj komplikaj:
Vivo kaj amo.
Estas du apudaj kalikoj:
Vivo kaj amo.
La miksaĵon el du kalikoj –
Amo en vivo,
Vivo en amo –
Trinku ni dum ploras salikoj
En printempa ĉiamo.

1967

Al miaj amikoj, edziĝintaj tro frue

Por D.K.

Por ĉiam vi restis en mia memoro
ridantaj, kaj sen avid'
mi sendas al vi kondolencon tutkoran.
Jen versoj – ankaŭ por vi.

...Delonge forpasis inundoj, militoj,
nek krioj, nek pafoj turmentas vin.
Vin ĉiam atendas ĉemiz' amelita,
taseto kun kafo, fidela edzin',
en kies okuloj, bovide kvietaj,
glacias senkulpa mir'.
Ĝaluze sed dolĉe ŝi ĉiam ripetas:
– Aŭ Esperanto, aŭ mi!
Jen tiel vi vivas en ora feliĉo
kun dolĉa matena gap',
kaj poste aperas pepanta filino,
kaj vindoj, kaj patra gaj' ...
Sed foje dolori komencas cikatroj
en via feliĉa anim'.
Kaj en rememoroj – nur vojoj, nur kantoj,
nur blua ĉielo sen lim'.
Reeĵos en revoj tendaroj turistaj,
fajreroj kaj nokta vals',
kaj ies okuloj, okuloj turkisaj
sen pigra altruda fals'.
Kaj gratas la koron ekzisto senĝoja,
maĉata kun abomen',
ĉar nure en sonĝo vi revas pri l' vojo,
kiun elektas mem.

1968

* * *

Somero – lazura kaj verda
trumpetas aŭroron.
Sunero petola kun vento
penetris la koron.
Pro ĝi, petolulo, ekflamis
anima senbrido:

subite animon ekamis
somera ebrio.
Subite aperis aromo
de rokoj kaj maroj.
Sopiron forpelis el domo
alvoko de mapoj.
Subite tedegis kanapoj,
malsobraj vizaĝoj -
kvieta knarantaj kanajloj
aŭ naŭze kuraĝaj.
Tedegis najbaraj kvereloj
pri ŝuo en supo...
Ĉu bone katunaj ombreloj
vin savas de suno?
Ĉu savas de tril' najtingala
veluraj kurtenoj?
Ĉu poplan lanugon egalas
lanugaj kusenoj?
- Forkuru!- min vokas radioj.
- Forkuru!- folia susuro.
- Al verda kaj blua hodiaŭ
forkuru, forkuru, forkuru!
Ekamu la sunan odoron
post sola ekflaro.
Antaŭen! Ne perdu l' aŭroron
dum neĝas poplaro.

1969

* * *

Pasis senzorga viv'
pasis ebria ornam...
Mia angoro – vi.
Mia turmento – am'.
Flustras ĉirkaŭa ĥor'
pri evidenta ĉagren':
– Via estont' – dolor'!
– Via helpont' – venen'!
Fuĝas mi en silent'
for de bigota mok'.
Mia amiko – vent'.
Mia animo – nokt'.

Sed en matena flam'
ĉerpas mi forton nun.
Mia feliĉo – am'.
Mia esper' – fortun'.
Kredu – degelos envi'
en la printempa motiv',
ĉar mia amo – vi!
Ĉar nia ĝojo – viv'!

1970

* * *

Facile fluas en mateno
de fora fajro fumodor'.
Nenio bruas – nur sereno
en urbo dum dimanĉa dorm'.
Tuŝetas arbojn vent' tenera.
En pezan akvon falas or',
kaj malrapida flu' rivera
foli-monerojn portas for.
Folioj oraj kovras padojn,
susuras seke sub pied'...
Plenigas domojn delikatajn
aŭtuna laco kaj kviet'.

Ĉu nur en mi la sentoj ardaĵ
aperas sub malvarma sun'?'
Ja vivas vi! Ja vestas arboj
dek mil kolorojn de l' aŭtun'.

1973

* * *

Melodio de Joe Dassin

Estus viv'
ekzist' enua sen bezon',
se ne trovus foje min
amata mia afer'.
Mia SEJM
vi estis kvazaŭ freŝa pluv',
mia ĝoj' estis via aper'.
En la jun'
mi revis pri l' eterna voj',

en komenco de l' aŭtun'
jam logis nova feri'.
Mia SEJM,
vi estis ĝojo kaj angor',
sentojn mil vi donacis al mi.

Mia SEJM,
ebriiga kiel juna am',
ĉiu jaro – la ŝtonet'
en roj' de mia destin'.
Adiaŭ, SEJM,
adiaŭ, mia hela jun',
pasis vi – restis vojo sen fin'.

1979

* * *

Mi povas sendi al vi neĝon -
miltunan, lanugan,
ĉielon puran, kiel preĝon -
profundan, sennuban.
Fieras frostoj en obstino
hieraŭ, hodiaŭ...
Ĉu vi ne aŭdas, amatino :
Adiaŭ!...

Mi povas sendi al vi sunon
el ora glacio.
Vintrego vartas mian nunon
jam ekster konscio.
De la poluso venas vento
kaj frapas la vitron.
Ne povas venki eĉ prudento
la vintron.

Kaj restas ĝojo ununura:
Sub vido envia
ĉiele malaperas spuro
de l' bruo avia.
Ankoraŭ ion mi atendas...
En bluo malplena
senmovo blanka sin etendas.
Apenaŭ!...

1984

Soneto

Se vi hodiaŭ nostalgion ĉerpas
Eĉ el restinta ardo de l'agem',
Se revoj viaj fakte jam enĉerkas –
almenaŭ vi supozas tion mem.

Se via preskaŭ kvardekjara sperto
Neniom helpas pri l'situaci',
Se nova tago venas sen espero,
Samkiel teo sen suker' al vi,

Nek la venenon prenu, nek la kuglon –
Nur amatinon kaj la lastan rublon
Por ĉerpi saĝon el ŝatata vin'.

Preferu ridon vi al sinkompatato.
Ja estas ĉiu kruda sortobato –
Nur gaja prova ŝerco de l' destin'.

1989

* * *

Mia bona amikin',
nekonata kaj malnova,
ie vagis la destin'
ĝis la tempo pli bontrova.

Ene de l' etenda viv'
ĉio estis, ĉio estis...
Eble ja en efektiv'
ni ne niajn festojn festis?

Nun ĉe nia vojkruciĝ'
haltis ni en embarasoj.
Brilis guto da feliĉ'
por la sekaj vivoglasoj.

Instruitaj de la sort'
nur apenaŭ sentojn fidi,
tamen pelis kordon kord'
ĝene ĝoji, reve ridi...

1992

Finna aŭtuno

Ŝtonoj kadukas en tempofluo,
regas trankvil' inter bluo kaj bluo.
Kredas apenaŭ varmo granita
famon pri la somero finita.

Ruĝo, skarlato, punco, purpuro
pompe plektiĝis en verda veluro.
Kupro kaj oro, bronzo, latuno -
jen la vesto de finna aŭtuno.

Lago lascivas ekster labor', do,
brunajn boatojn brakumas ĉe
bordo,
kaj el la fundo, el akvosino
supren iras la sun'-karmezino.

Kaj la perukon el okro kun rusto
prove surmetis ĉiu arbusto.
Zorgas trankvile morti en festo
de l' naturo kvieta majesto.

Nur disonance en movimento
sonas sopira kordo de l' vento,
svinge spiretas lace petola...
Ĉu ne tro da kviet' por mi sola?

1994

Al...

Mi ne kuraĝas tiom peki,
plibonon de l' destino peti,
ĉar multon jam donacis ŝi.
Mia destin', kaprica damo,
mi vin ne trompis en iamo -
do, amu min dum vivas mi.
Do, amu min dum vivas mi!

Dum restas forto en la brako
por levi glason da konjako

en mia bona kompani', -
al vi vojaĝos mi pilgrime,
al vi mi preĝas proze, rime, -
do, amu min dum vivas mi.
Do, amu min dum vivas mi!

La ĝuo de kantad' senzorga
ĉesiĝos morgaŭ aŭ postmorgaŭ,
kvazaŭ fantoma iluzi'.
Al mia voĉo surkasede
vi gapos pigre kaj oscede...
Do, amu min dum vivas mi.
Do, amu min dum vivas mi!

Aĥ, mia sinjorin' aminda,
kunigis nin okazo blinda.
Ĉu la komprenon donos Di',
ke foje flugos ni fantome
sen eblo kuni korpe, home?!
Do, amu min dum vivas mi.
Do, amu min dum vivas mi!

Ĉu nur ĉagreno ironia,
aŭ pura am' en iro nia -
kion mi volus havi pli?
-Ke daŭru plu la samaj strioj
de festoj miaj, plagoj miaj.
Do, amu min dum vivas mi.
Do, amu min dum vivas mi!

1995

* * *

Mi lanĉas novan aventuron.
Valizo kaj gitaro pretas.
De trajnaj radoj hastan kuron
la viglaj revoj nun ripetas.
Mi lanĉas novan aventuron.

Adiaŭ, viv' malpoezia!
Saluton, vojoj kaj renkontoj,
odoroj de la mond' vizia,
amikoj, kantoj kaj rakontoj!
Mi lanĉas novan aventuron.

Ekzist' rutina forgesendas,
impresojn novajn vojo sendas -
ŝatindaj urboj, ĉarmaj homoj,
de l' nekutima viv' aromoj.
Mi lanĉas novan aventuron.

La neĝa frid', la bunto verda,
la inkandeska sun' dezerta –
la tuta mond' por mia miro,
kaj por impet', kaj por inspiro.
Mi lanĉas novan aventuron!

Se ial, ie kaj iame
ies rigard' rebrilos ame -
la koron lacan dum descendo
revekos nova rava sento...
Mi lanĉas novan aventuron!

Akceptu, mondo, min amike.
Por vi mi kantas. Kredas mi, ke
ĉiumomente, ĉiuloke
ni nin ĝojigos reciproke.
Mi lanĉas novan aventuron.
jul. 1997 – aŭg.. 2004

* * *

Mi foriris el frostoj.
Mi veturas al Sud'.
Adiaŭas min fostoj
en fervoja apud'.
Vekiĝanta herbaro
kaj padusa ekstrem',
kaj ĉielo neklara -
kontraŭ mia irem'.

Apudurbaj kabanaj
svagas en malproksim'.
Kapo plenas je planoj,
tentoj, revoj kaj tim'.
Ĉu libero aŭ ŝajno
estos mia promen' ?
Pace iras la trajno,
pace revas mi en.

Kvankam estus pli bona
terfosado ĉe roj',-
mia mio fripona
min akcelas al voj'.
Kun gitaro benita,
kun esper', kun sagac'
tra l' Eŭropo milita
mi ekiris kun pac'.

Transe blankas nur prujno,
ene blankas paper'.
En la frapa dormujo -
eta kaĝ' de l' kupe' -
io en la kranio
sen perfort', sen persvad'
naskas freŝan linion
ĉe senfina frapad'.

La situo de steloj
gravas, tamen ne tre,-
ja ne veloj, sed reloj
gvidas min al la rev'.
Versoj kovros folion,
ŝirmos nokton kurten',
kaj ekziston alian
portos nova maten'.

15.05.99

* * *

Sennombras stelaro sennoma
en la Galaksio.
Ja, tute ne gravas la homa
nescio aŭ scio
por ili, lumantaj libere
tra tempo kaj vasto.
Samtiel ellumas surtere
sen brua bombasto
modestaj poetoj, revuloj
la vortan sinceron.
Kaj tiu kvieta forbrulo
varmigas la Teron.

apr. 2000

Venis printempo...

Venis printempo peka,
pela, provoka, veka,
pluva, degela, seka,
sana aŭ apoteka.

Venis printempo pika,
loza, lanuga, lika,
arda, amorefika,
hela kaj eĉ helika.

Venis printempo drola,
fajna, fragila, fola,
brila, beata, bola,
pranca, priamparola.

Venis printemp' ebria,
kvika, kvivita, kria,
festa kaj fantazia,
kaj ja refoje – mia !

apr. 2001

Ekskurso

Ĉu mi povus almenaŭ esperi, ke
mia tre diboĉema destin'
en muzeon de Otto von Guericke
senpripense venigos min?

Sed mi devus iom kleri por ke,
scii, kiu estas von Guericke...

Jes, mi lernis fizikon en infanaĝ'
sed apenaŭ memoras mi, ke
la vakuon eltrovis per sia saĝ'
tiu Otto von Guericke.

Do, al lia kastelo iras mi kun
ekskursanta aro por scii nun...

L'ĉiĉerono klopodas liveri, ke
politiko kaj diplomati'
estis ĉefokup' de von Guercike,
kaj pro tiuj gloriĝis li.

Mi bedaŭras – tereno de l' diplomati'
nur dezert' malplena estas por mi...

Ni ascendas al la scienca salon' .
Jen globegoj el pura sulfur',
kiujn uzis por ludoj kun elektron'
en Eŭropo li sola nur.

Kaj nun mi, elektristo, certiĝas, ke
estis mia kolego von Guericke.

Duonglobojn tenatajn per la vaku'
disen tiras jungita aret',
konsistanta el ĉevalegoj dekdu,
instigata per vipoj, sed -

ne sufiĉas ĉevaloj – eĉ dekduop'
por konkeri l' vakuon en tiu glob'.

Etulin' proksimiĝas en bela rob',
ion turnas, eksiblas la kran',
kaj je du duonoj disfalas la glob'
sen asist' de l' potenca man'.

Kaj certiĝas ĉiu – 'stas vero, ke
geniul' estis Otto von Guericke.

Kaj foriras mi el la muzeo kun
iom malpli da enkapa vaku'...

2002

Francineto Klara

Eksterordinara
estas vi, kvarjara
francineto Klara,
aŭ, laŭfrance, Claire.

Venis mi, la gasto,
kaj vi sen prokrasto
emas tuj en hasto
min okupi per

ludoj atakantaj,
ekzercadoj kantaj,
babiladoj vantaj –
en la franca, ve!
Laca postalvene,
mi komprenas pene,
sed al vi eĉ ĝene
mi ne diras “Ne.”

Mi kunludas, aŭdas,
kantas kaj aplaŭdas –
ĉio bone taŭgas –
jam amikas ni!
Ĉesas vi tumulti,
pretas por aŭskulti.
Ekas la rakonto
pri la land’ Rusi’:

Pri ursidoj drolaj,
pri neĝeroj molaj,
kaj pri pom-piroloj
en la fora land’.
Kaptas vi, katido
ĉion ĉi dum sido.
Post kredema rido
venas la demand’:

- Oĉjo Miĉjo kara,
sed ĉu rajtas Klara
al la land’ Rusio
akompani vin?
Mi meditas, miras
kaj responde diras:
- Ĉu vi ne sopiros
tie pri l’ patrin’?

Tuj vi prenas pupojn,
ĉevaletojn, jupojn,
saltas trans du ŝtupojn

vi al la patrin':
- Panjo, kara mia,
al la land' rusia
prenas min la oĉjo,
kaj mi prenas vin!

17.01.03, Sainte-Foi La Grande

Polonezo

Super ĉiutaga pezo,
super vivrutino ŝajna
levis min la polonezo,
savis min la polonezo
dum la ĝua nokt' jarŝanĝa...

Pompaj paroj, pimpaj paŝoj
en memfido melodia.
Blankaj tukoĵ – vivopaĝoj,
forflugantaj vivopaĝoj
de la jar' pasinta mia –

Disreviĝoj kaj ĉagrenoj,
trompoj, perdoj, fuŝoj, faloj,
miskondutoj, miskomprenoj,
adiaŭoj kaj revenoj –
esingiĝas malrealaj

en etendo de la danco,
en majesta noktomezo.
Nova Jaro, nova ŝanco,
festa paŝo, kora pranco –
multpromesa polonezo!

31.12 2003 – 01.01.2004

* * *

Konservis nur ombron de nia proksim'
lupole kovrita altano.
Vagadas fantome la sentoj en sin'
de l' densa aerdiafano.

Amare sensonas malplena trankvil'
por mia soleca obsedo,
nur daŭras brueto de burda babil'
rondire ĉe l' bunta florbedo.

En pigra senvolo forestas dezir'
ekŝvebi, ekflugi kun juna admir'
al nova intrigo...

La blanka kapeto de vila aster'
humile, senhelpe sin klinis al ter' –
laciĝis la tigo.

19.09.04

Mi estas kiel vi

Mi estas kiel vi,
mi estas via ero,
la karn' de via karn',
la sang' de via sang'.
Bongustas ĉiu vort'
el via vort-utero,
frandindas ĉiu son'
por mia viva lang'.

Mi estas kiel vi,
ni sonĝe vidas samon,
ni samas en impet'
kaj en anima flam'.
Akceptas mi de vi
kaj amon kaj malamon,
sed revas certe, ke
ĉeestu pli da am'.

Mi estas kiel vi,
min lezas viaj mankoj,
ne bonas via mis'
por mia sangoprem',
sed mi defendas vin
per la fidinda man', kaj
samkiel en real'
defendus mi min mem.

Mi foje dum diskut'
ne tuj kapablas nei
akuzojn de l' rival'
en duba malkomfort',

sed post momenta dub'
jam pretas malkabei,
per trafa argument',
per via prava vort'.

Se en molesta hor'
ripetos historio
la nigrajn paĝojn de l'
kruela persekut', -
mi estas kiel vi,
do certe, malgraŭ ĉio,
nur senatenda paf'
kondamnos min al mut'.

Mi estas kiel vi,
mi mem elektis tion.
Ho vi, Esperantuj' –
feliĉa vivdestin'.
Pro trafa koincid'
mi devas danki Dion:
vi estas kiel mi,
kaj mi adoras vin.

11.06.05

Novjaro en IF. 31.12.05

Silentiĝas brueg' en la gaja salon',
Kaptas lastajn sekundojn krepusko enkorde
Haltis sled' de l' Novjaro ĉe l' festa peron',
Ĉar la tempo plu daŭras – senĉese, senmorte.

La rideto sopira, enpensa forkur' –
Adiaŭo kun jar', forfluanta el vivoj.
Spirohalta streĉiĝo, eksvinga susur' -
Jen subita impulso de l' sentoj naivaj.

Kaj ektinte pokalon salutas pokal',
Infanecan ekĝojon estingas nenio,
Kvazaŭ post la dekdua horloĝa signal'
Ĉies viv' komenciĝas de l' pura folio.

A I S.Ŝ.

Saluton el Tihvin, Spomenka!
Restad' mia, preskaŭ momenta,
kelktaga sed ja multeventa,
penetras ensonĝe al mi.
Mi ene de l' samideana,
sampensa, samĝoja, sampana
publik' en montaro lontana
plu restas en reva vizi'.

Saluton el Tihvin, Spomenka!
Plu daŭras rutin' senkomenta,
tristiga kaj malkomplimenta,
de l' temp' senrimorsa rabist'.
Sed restas kun mi l' destindotoj:
min savas la pensoj, la fotoj,
la vortoj – dirotaj, skribotaj –
jen la kuracil' kontraŭ trist'!

Saluton el Tihvin, Spomenka!
La mond' estas kvarelementa,
ĉe kred' pri l' kvarop' fundamenta
mi tamen insistus pri ses.
Por ni, vojaĝantoj, verkantoj
la mondo ne eblus sen kantoj
kaj sen rememoroj, vekantaj
impeton por vivi. Ĉu jes?

Saluton el Tihvin, Spomenka!

aŭg.2007

La landlimo

Kiel vica stultaj' sed ne timo,
venas nokte la latva landlimo
per vekado far uniformitoj -
ven' subita de l' homoj subitaj.

Tiuj uniformitoj senŝerce
sian taskon plenumas ekserĉe,
kaj valizojn prezentas sen volo
vekiĝinta vagona popolo.

Miaŭas kato, benante la sorton –
l'kato havas litovan pasporton,
do vojaĝas sen peti pri vizo
en plektita korbet', ĉe valizo.

Grumblas avo, montrante naivon:
Damne, mi liberigis Latvion,
eĉ vundita mi estis ĉe Ventspils...
ĉu vi novan militon komencis?

Katmastrino replikas al tio:
Vi alvenis por okupacio!
nur dum lastaj dek jaroj, ververe,
ni finfine ekvivis libere!

La disput' doganistojn ne tentas,
ili nur pri valizoj atentas,
kaj flavbeka serĝent' senmalice
lerte stampas pasportojn laŭvice.

Miaŭas kat', avo paŭtas kun tristo,
kaj meditas mi, esperantisto,
pri la baroj obstinaj, doloraj,
plu starantaj en kapoj kaj koroj.

Ili pro l' sankta am' ne dissaltas,
ili feras, betonas, asfaltas,
ĉe okaz' agreseme ekprancas...
Miaŭas kato. Nur al ĝi bonŝancas.

25.05.08

Kajto

Alvenas mia tria jun'.
Adoleskanto,
renkontas mi Novjaron kun
konvena vanto.

Dorlotas dolĉa melodi'
la lipojn fajfe.
Ĉielen ekimpetas mi
trankvile, kajte.

Ekŝvebu kanto en aer'
ĉe l' vent-murmuro,
kaj firme ligu al la Ter'
min fajna ŝnuro,

kaj miaj bondeziroj en
cent mil neĝeroj,
al vi libere flugu sen
bariloj teraj,

sed min en vanta tempokur'
dum flug' magia
plu ligu l' fajna kajta ŝnur'
al vivo mia.

18.12.08

* * *

Jes, nia mondo malperfektas,
sed ĉiu revas kun obstin',
ke iam la fortun' elektos
por la triumfo ĝuste lin,

Kaj plendas apud viv-finalo, -
se ne okazis la elekt', -
ke ne en li 'stas la kialo,
sed en la monda malperfekt'.

23.09.2009

Pasta

Tage kaj vespere al restoracio
iras ni por manĝi kun fiera scio,
ke la plado nepra, fasta kaj malfasta,
estos ja sendube senevita *pasta*.

Kio estas *pasta*? Ĉio estas *pasta*!
De la tag' unua ĝis la tago lasta
al makaronioj, kukoj kaj nudeloj
nun stomakoj niaj estas plenfidelaj.

Parmezan' raspita, saŭco melongena,
fiŝoj kaj viandoj – ĉio tre bonvena
ĉe la ĉefa plado grava kaj bombasta,
en la kompilado kun reganta *pasta*.

Ĉiopova pasta, la nutraĵo drasta!
Svarmas sinjorinoj kun la haŭt' elasta,
mamoj reliefaĵ, ventroj sate ŝvitaj,
kaj pugetoj pufaj, ege apetitaj.

Eĉ la sun' ĉi tie ŝajnas nun pli vasta,
pro l' efik' magia de la sorĉa *pasta*!
Floroj odoregas, fruktoj sukoplenas, -
eble ĉion tion same *pasta* benas...

Edenece logas ĝis la lipomordo
pompaj nudaj korpoj ĉe la mara bordo.
Ĉu pensado mia povas resti ĉasta?
Pelas ondo ondon: *pasta, pasta, pasta!*
23.08.2010

Al...

Reenkarniĝ' de l' fora sento,
ekflam' vizia –
kvazaŭ stopiĝis radodento
de sorto mia.

Eksteratenda renkontiĝo,
donac' destina –
ĝuinda guto da feliĉo
en viv' rutina

retrovis min ĉe l' frosto vintra
en bruo strata,
aŭ mi, la guton retrovinta,
do jam benata,

memore l' guton enkadrigu
por ke ensonĝe
la memoraĵo plu nin ligu
ĝuinde, plonĝe.

Sed pro la superstiĉo klara
mi brovojn movas:
- La saman akvon, mia kara,
oni ne povas

dufoje paŝi, tamen jen ĝi –
la dua fojo!
Se la destin' preferas venĝi
per tia vojo,

do kraĉu mi pri l' superstiĉo
transŝultren, liven -
kaj prenu l' guton da feliĉo
en mian vivon!

10.02.11

Fervoja historiĉeto

Mi konatiĝis kun fraŭlin'
entrajne.
Ni reciproke ŝatis nin.

Verŝajne,
bonŝancis inter ni amer'
trafulmi,
Ĉe l'takta bru' de "chemin de fer"
ŝi kun mi
babilis, kaj parola ĉarm'
de ŝia
voĉet' sincera tentis, ĉar
ebria
sen vin' pro l' tuja enamiĝ'
banala
mi estis. Lulis min feliĉ',
kaj al la
fraŭlinjo eĉ kantetis mi
ĝojplene.
Kisetis mian vangon ŝi
alvene,
kaj malaperis kun valiz'
en tramo.
Dirinte nur: "Avoĉjo, ĝi-is!"
Eĥ, amo...

08.01.2012

* * *

Mi rimarketas foje distre
gapante tra l' vizaĝ-spegulojn,
ke ĉiu mia eta mis' tre
ĝojigas kelkajn ĉeajn ulojn.
Do mi kontentas, homoj karaj,
ke al vi, pli ol unu fojon
donacis misoj malavaraj
la bonhumoron kaj ekĝojon.
Krom tio diru mi admone
sen ajna ofendiĝo drasta,
ke, onidire, ridas bone
ja tiu, kiu ridas lasta.

06.04.2013

Al..

Ŝi ĉarmis, jes! Por la admiro
la koro etis.
Mi revis esti ŝia viro,
kaj ŝi ridetis
promese, senpudore, ŝoke!
En rid' senkulpa
fajrerojn amajn serĉis voke
l' animo stulta.

Ŝi tentis min. La am-deliro
l' racion venkis.
Mi revis esti ŝia viro
dum ŝi flamenkis,
dum ŝi senzorge kaj gracie
la brakojn movis...
Mi provis trakti ŝin konscie,
sed mi ne povis!

Jam sklavo. Ne plu kavaliro.
Ne plu fiera.
Mi revis esti ŝia viro,
kaj efemera
malĉasta pens' komencis vagi
en sino mia.
Plu vokis revĵi kaj imagi
la tent' mania.

Sed li min venkis sen turniro
sen bat' insida,
ne atendita, kiel sbiro.
Nun adresita
al li la rid' kaj la aspiro,
konsterna por mi.
Mi revis esti ŝia viro...
Mi iru dormi.

29.12.2014

* * *

Plej molas lanugo neĝa,
plej blankas lanugo neĝa,
plej brilas lanugo neĝa
kaj tie, kaj tie ĉi.
Refoje l'arbaro reĝa,
refoje l' arbaro preĝa,
refoje l' arbar' sieĝa,
kaj en la ŝieĝo – mi.

L' okulojn sieĝas blanko,
frostego – de ĉiu flanko,
sed eĉ pro konjak' - manko
ne lezas min la sieĝ'.

La froston mi nun kun danko,
la blankon mi nun kun danko,
eĉ mankon mi nun kun danko
perceptas en nova neĝ' ,

ĉar ravas min dum la staro
reganta la koron klaro,
ĉar novas mi kaj la jaro
sen sorĉo kaj alkemi'.

Da fortoj en mi – maro!
Da sentoj en mi – maro!
Refoje mi – en la arbaro,
refoje l'arbar' – en mi!

17.01.2016

* * *

Ne enrampu mian vivon, sinjoroj,
ne kalkulu miajn mankojn en van', kaj
ne forgesu ĉe la agoj fetoraj,
ke nemultaj estas tute senmankaj.

Ne esploru mian vivon, sinjoroj,
nu, almenaŭ dum mi restas vivanta.
Fakular' prifeka kaj amatoroj
iru for el mond' mia kanta.

Kaj ne laŭdu mian vivon, sinjoroj,
tiuj kiuj antaŭ jaroj ĝin mokis,
Oni scias ja, ke viaj esploroj
homojn eĉ la plej honestajn sufokis.

Antaŭ mort' l'arkivon mi ne bruligos,
eĉ se restos io por la kritikoj.
Ne prifekos min kaj ne idoligos
miaj karaj kaj honestaj amikoj.

Mi ĉeestas plu en mond' mia bela,
provas verki por animoj kaj koroj...
Kaj dum tiu ĉi ĉeest' malmodela
ne enrampu mian vivon, sinjoroj!

17.02.2017

La vivo

Novjara aranĝo.
Rigard-interŝanĝo.
Subita stultiĝo.
Interkonatiĝo.
Parolo pri l' ŝato.
Tostad'. Brudersafto.
Invito. Hezito.
Anima kolito.
Bukedoj. Bombonoj.
Ofendoj. Pardonoj.
Promen'. Diskoteko.
Kunkuŝo. Kunveko.
Vojaĝo. Foiro.
Kverelo. Foiro.
Fejsbuko. Paciĝo.
Renkonto. Kuniĝo.
Ĝemeloj. Kredito.
Rutino. Kolito.
Riproĉoj. Tolerero.
Disput'. Ekkolero.
Kokrad'. Reciproko.
Kunvivo. Kunmoko.
Dum jaroj la samo.
Ĉu amo?

27.06.2017

* * *

En la malluma frosta horo,
se mava sonĝo l'koron premos,
min savu, mia rememoro, -
mi vin en sonĝon mian prenos.

Florigu la pomarbojn fato,
la suno maja brilu arde,

En okulpar' de mia kato
pasioj regu malsingarde!

Kaj ankaŭ min reprenos tento
karesi, tuŝi, kisi, peki,
ĉar ja scipovas nur printempo
en frosta koro amon vekti.

01.02.2018

* * *

Mia olda Eŭropo,
min senĝene amanta,
ne trodolĉa siropo,
sed nur versa kaj kanta
mia pura adoro
vin responde glorigas –
tiel mi, amatoro,
vojaĝante intrigas.

Mia milda Eŭropo,
jam konata parkere,
trinkis mi ja ne tro – po
sepdek gramoj ververe
ĉe neofta ripoz', do
dum vagado milzorga
glason levis kun tosto
por revidi vin morgaŭ.

Mia linda Eŭropo,
vi por mi plu misteras,
kaj en mi filantropo
senkonscie aperas,
deziranta al vi nun
dum tostado alvoka
levi same la vinon –
je la am' reciproka!

aŭg. 2018

Por mi pli ofenda ol bato,
farita de bona konato,
ja estas kompota kompato,
senpeka minpika kompato.

Evitu kompati envie
min en mia paca ekzisto.
Ĝi tute komfortas por mi eĉ
se estas ĝi ne paradiz', do
mi fartas en mia rutino,

farante nur kion kapablas,
kaj mia kaprica destino
ne ĉiam por mi malafablas.

Se donas al mi, eĉ mensoge,
ŝi l'senton de krea ekflugo,
mi kredas, verkante en sol', ke
ne tute malbonas la ludo

de l'vortoj, de l'rimoj, de l'sonoj
ĉe la rondodanca frapado
enkape.

Ne venas bezon' al
pikanta kompota kompato.

18.11.2018

Pentoarto

Necesas bona motivad'
Por naĝi en komuna fluo.
Mi eĉ oscedas pro enuo,
Paŝante laŭ konata pad', -
Elektas ĝin por la movad'
Ŝatantoj agi enamase,
Por asecuri sin de mav', se
Aperos danĝereta grad'.

Ĉu tiu prizonĉela krad',
La genetika rememoro,
Kelkiujn igas kun fervoro
Dediĉi sin al la irad'
Solena, kvazaŭ dum parad',
Sub la trivita olda flago,
Aŭ estas nur singarda ago
De ĉiu virta kamarad'?

Jes, mi enuas, kaj gapad'
Al ĝi ne entuziasmigas.
Mi pentas. Sed mi min flankigas
Al dorna, glita – propra pad'.
La paŝo stumblas, kaj la rad'
En kotoplana vojokulko.
Jes, mi sukcesas ne pri multo,
Sed pli facilas la spirad'.

08.02.2019

Originala prozo de Mikaelo Bronŝtejn



La pafo de moruso

Varmega aŭgusto 1989. La sovetia sudo. Jalta, belega urbo ĉe la Nigra Maro, la mekko por la diversklasaj ripozantoj sen revo pri aliaj ripozlokoj de la mondo, plej ofte eĉ sen imago pri tiuj.

Ĉe vesperiĝo la suno, perdinta sian tagan malicon, dum du-tri horoj, ĝis abrupta krepusko, restadas kun sia milda varmo super la mara kvieto. Ombroj de cipresoj, platanoj, tujoj, morusarboj pli kaj pli vastiĝas, malavare prezentante kontraŭsunan azilon por la ŝvitanta homamaso.

Ĉe vesperiĝo sur la strando okazas ŝanĝo de generacioj. Gepatroj kaj geavoj, venintaj al la maro kun malgrandaj infanoj, nehaste retiriĝas al siaj portempe luataj hejmoj. Ilin anstataŭas junularo, venanta ĉi tien por naĝi en la maro, pilkludi sursable, interkisiĝi, amori kaj diboĉi – longe post la noktomezo. Du homfluoj, direktitaj al kontraŭaj flankoj. La forfluantoj estas konsiderinde malsataj, do rapide plenigas la kajkafejojn kun apudaj tabletoj, atakas la budojn kun sandviĉoj kaj trinkaĵoj, ĉasas la kolportistojn kun kukoj, apenaŭ bezonataj matene.

Aparta afero – la plej frandinda suda specialaĵo – estas ŝaŝlikoj. Kelkaj viroj kun korvokolora hararo kaj elokventa transkaŭkazia elparolo havas siajn konstantajn lokojn sur la kajo por instali tie mangalon¹ kun inkandeskaj karboj, tableton kun bezonata ilaro kaj enorme grandan kaserolon kun spicitaĵoj. Ŝaŝlikoj estas postulataj dum la tuta tago – neniam mankas aro da dezirantoj gustumi la frititan viandaĵon kun cepoj, tomatoj kaj iom da tikla-tenta fumodoro. La transkaŭkaziaj viroj havas laboron vere ŝvitigan kaj lacigan. Rapide kaj lerte ili pikmetas laŭorde pecetojn de viando, runde tranĉitajn tomatojn kaj cepojn sur metalajn stangetojn, instalas plenajn stangetojn sur la mangalo super la karba ardego, turnadas la stangetojn ĝis fritpreteco de la viando, kaptata per tradiciaj nazegoj, metas pretajn ŝaŝlikojn sur paperajn pletojn, priverŝas ilin per keĉupo, metas apude pantranĉojn, donas la pletojn al la aĉetantoj, prenas monon de tiuj, ĉe bezono donas la repagon, zorgas pri konvena kvanto kaj brulado – nepre senfajra – de la karboj kaj metas, metas, metas sur la mangalon novajn ŝaŝlikojn... Ĉu je la vesperiĝo ili estas tro lacaj, ĉu elĉerpiĝas ilia tagprovizo de la ingrediencoj – tiel aŭ alie, ĉe la vesperiĝo apenaŭ unu aŭ du ŝaŝlikistoj daŭre restas en siaj laborlokoj. Do ĝuste tiujn restintojn plej entuziasme sieĝas la malsata refluo.

Ĉirkaŭ la sepa posttagmeze nur unu ŝaŝlikisto restas sorĉanta ĉe sia mangalo. La mangalo estas trafite lokita en la ombro de kolosa morusarbo, tamen iom flanke de la arbo mem, je sekura distanco, ĉar tromaturaj, ĝisnigre violkoloraj beroj jen kaj jen faladas, kovrante la subarban asfaltan per sukoplenaj makuloj. Ankaŭ la amaso de malsatantoj zorgeme viciĝis tiel, ke la beroj ne trafu iliajn kapon aŭ vestojn. Jelpas kelkaj infanoj, ricevinte punon pro atenco preni la morusberojn falintajn teren...

Vendinte vican kvanton da pretaj ŝaŝlikoj, la transkaŭkaziano ŝovas sian enorman kurban nazegon en la kaserolon kaj per raŭketa voĉo, en kiu diveneblas kaj pardonpeto kaj kontento, anoncas al la viciĝinta amaso:

– Kamaradaj, fina por hadiŭ! Eble-eble, dudek... eble, dudek kvin ŝaŝlik'-baŝlik' restaĵa... – li levas la kapon, per du fingroj prenas de sur la nazego cepan ringeton, mire okulumas ĝin kaj, kun ia sakraĵo, neklare balbutita sialingve, ĵetas en apudan rubujon. – Fina por hadiŭ! – ripetas li, rigardante la malsatulojn per du kulpe rebrilaj olivoj.

– Kia fino? Kial do fino? – ekskandalas la homamaso. – Oni devas averti anticipe! Jam duonhoron ni staras ĉi tie! La infanoj malsatas!

– Vaŭ! – la ŝaŝlikisto elokvente disigas la brakojn, kaj liaj olivoj ĵetas al la skandalantoj eĉ pli kulpan rigardon.

Li explore paŝas laŭlonge de la vico, kolektinta ne malpli ol kvardek plenaĝulojn kun preskaŭ sama kvanto da infanoj kaj, atinginte la finon de la vicovosto, per gesto de fakiro trovas enpoŝe de sia blanka antaŭtuko kelkajn karamelbombonojn.

– Jen por vi... por vi... por vi... – li disdonas la bombonojn al la infanoj, lastaj en la vico. – La onkla estas bona-onkla... venu morguŭ por ŝaŝlik'-baŝlik'...

¹ mangalo: rektangula metala ujo, kie brulas lignokarboj, uzata por fritado de ŝaŝlikoj.

La amaso iom paciĝas. Starantoj en la vicofino grumble elbuŝigas ĉion, kion ili opinias pri la afero, tamen reprenas sian vojon hejmen. La restintoj postulas, ke la “bona-onkla” anoncu precizan kvanton da preparotaj ŝaŝlikoj. Tiu refoje ŝovas la nazegon en la kaserolon kaj post minuto deklaras solene:

– Dudek tri ŝaŝlik’-baŝlik’! Dudek tri! – li ripetas kaj montras per la fingroj de ambaŭ manoj dufoje po dek kaj poste tri fingrojn de la maldekstra mano.

– Sstop! – iom sible-fajfe kriegas aveto en pajla ĉapelo. – Mi postulas jusston! Mi postulas, ke al ĉiu oni vendu ne pli ol unu ŝaŝlikon!

– Kial do?! – indignas magra blondulino, staranta dua aŭ tria ĉe la mangalo kun knabineto, eble, kvinjara. – Sed al la infanoj?

– Ssenprobleme! – fajffas la aveto. – Unu persono – unu ŝaŝliko! Ankaŭ infano estas perssono!

La amaso eligas kelkajn aprobajn eksklamaciaĵojn. Iu iniciatema obezulino el la mezo de la vico laŭtvoĉe ekkalkulas la vicon popersone, inkluzive infanojn, nun timeme sin premantaj al la gepatroj-geavoj. Etan avinjon ŝi anoncas la dudekdua, knabineton en blankpiza ruĝa robo, evidente, nepinon – la dudektria. La fajfanta aveto estas staranta ĝuste antaŭ ili, do li silentiĝas, kontente frotante la sekajn polmetojn. Kelkaj plenaĝuloj, kiuj ne trafis la bonŝancan ŝaŝlikan kvanton, morne startas for, kolere admonante sian malsatan etularon. La ceteraj pace kaj kontente observas sorĉadon de la ŝaŝlikisto. Cetere, tiu, tute indiferenta pri la popolnombro kaj aliaj kvereloj, daŭre trankvile faras sian laboron, pleniginte la superkarban surfacon de la mangalo per la lastaj ŝaŝlikoj.

Kaj ĝuste en tiu momento surhorizonte aperas problemo. La problemo venas kiel figuro de alta virego, ĉirkaŭ sesdek kvin jarojn aĝa kaj, versimile, cent tridek kilogramojn peza, en luksa senmanika bluzo el natura silko. Kune kun la problemo, fiere preterpasante la vicon, proksimiĝas al la mangalo pliaj problemetoj – estas iom malpli alta, sed same dika kvardekjarulino, evidente, filino de la virego, kaj du buboj, eble, dek kaj dek kvin jarojn aĝaj, kopie similaj al sia panjo.

La virego kun sia grego haltas ĉe la flanko de la mangalo kontraŭa al la vico, pigre malbutonumas surbrustan poŝeton de la bluzo kaj tiras de tie iun brunledan atestilon. Li ŝovas la dokumenton sub la nazegon de la ŝaŝlikisto kaj laŭte deklaras – certe, por la vico, sed rigardante nur al la ŝaŝlikisto:

– Invalido de la milito. Kvar ŝaŝlikojn!

– Kamarada invalida... – la ŝaŝlikisto pente levas sur la viregon siajn olivojn. – Estas la lasta ŝaŝlik’-baŝlik’, jen ... por tiu kaj tiu kaj tiu. – Li kurbofingre montras al la homoj, starantaj en la vico. – Ne plu. Morgŭ venu, kara kamarada!

La vico silentas en ia momenta stuporo, sed sentebblas ekŝvelo de la sentoj kaj baldaŭa krevado de la silento. La virego kvazaŭ ne rimarkas tion. Li refoje ŝovas subnazene de la ŝaŝlikisto sian dokumenton kaj same pigre, sed jam minacete, kun abomena-orgojla moktono elparolas:

– Ĉu ci ne vidas, rajlĉjo? Mi diras al vi: invalido de la milito. Estas mi. Kun mia familio. Mi havas rajton ricevi ciajn ŝaŝlikojn ekstervice.

La silento krevas tuj kaj bruske. La infanaro ekjelpas. La plenaĝuloj svingas la brakojn, multvoĉe penante klarigi al la virego, ke lia konduto estas maldigna, ke li

rajtas aĉeti ion ajn ekstervice nur en la ŝtataj butikoj, ke ĉiuj ili estas starantaj ĉi tie, en la vico, preskaŭ unu horon, ke la infanoj, multe pli etaj ol la buboj de la virego, malsatas... Vana afero. La virego forŝvingas ĉiujn per grandega harkovrita brako, lia filino grumble tradentas duonvoĉe: “Ne estas via hunda afero...”, la buboj kun silenta agresemo okulumas la incititan amason. La aveto en pajla ĉapelo, intertempe altrotinta antaŭen, levas la brakon al la punca vizaĝo de la virego kaj eksvingas similan brunledan libreton.

– Ssstop! – li krias fajfete. – Ĉessu! Ankaŭ mi! Mi... Mi estass invalido, ssed mi sstarass en la vico! Esstimu la homojn!

– Stultulo vi estas, avĉjo... – la virego amikeme frapetas la ŝultron de la aveto. – Vi rajtas – do ricevu la unua. Poste mi. Kaj ne disipu la nervojn.

La aveto staras kun malfermita buŝo, serĉante konvenajn vortojn. Tiumomente kvar aŭ kvin tromaturaj beroj lasas la suprajn branĉojn de la morusarbo kaj celtrafe falas sur la luksan bluzon de la virego. Kelkloke sur ĝi ekkreskas disflue nigre-malvaj makuloj. La virego, komence konsternita, turnas la kapon, observante kreskon de la makulegoj, kaj post sekundo eligas koleran blekon:

– Sakre! Damne! Mia bluzo!

– Aj! – krias lia filino. – ne maltrankvilu, paĉjo! Ni lavos ĝin perfekte!

Tiam la ŝaŝlikisto, silentinta ĝis nun, eligas trankvile kaj edife:

– Nenia lavo, kamarada... Forĵetu! Tut² vi neniam lavi... Neniam.

– Saĝe! – pace diras la aveto. – Nun, kamarado, vi esstas vera invalido. Kaj vi rajtas, kompreneble, se via konscienco permesas...

La virego, eĉ pli punca ol antaŭe, kraĉas flanken kaj haste ekiras for. La filino kaj la buboj ektrenas sin post li, akompanataj de amasa ridego.

² Tut – moruso, morusbero

Poezio, tradukita de Mikaelo Bronŝrŝtejn

El la ukraina

Stepan Rudanskij

Dio donis...

Por laboro foran landon
Iris juna viro.
Sola restis l' novelzino
En vilaĝsopiro.

Li laboris, laboregis,
Arde ŝparis monon,
Kaj revenis post kvin jaroj
hejman regionon.

Vidas viro: jen anstataŭ
Kabanet' rompita
Staras brika dom' impona
Per tegol' kovrita.


Ĉe la sojlo lin renkontas
L' edzineto bela
Kun koliero, oraj ringoj
Kaj robo fabela.

L' vir' en miro kaj deliro
Pro l' parfum' – aromo
Petas: – Edzineto, diru,
De kie la domo?

- Dio donis, – ŝi ridetas
Responde al tio.
- Ha, ĉu vere? Jen la beno,
Do gloron al Dio!

En la domon li eniras
Kun ekscito forta,
Spektas ene kaj plu miras
Pro l' riĉec' komforta.

Ŝike logas la meblaro,



Plenplenas komodoj,
Ŝirmas vaston de l' fenestroj
Kurtenoj plej modaj.

L' viro gapas kun admiro:

- De kie la bono?

L' edzineto nur ridetas:

- Same – dia dono.

- Ha, bonege! – kaj la viro

Krucsignas kun pio. –

- Se la bono – dia dono,

Do gloron al Dio!

L' vir' kontente kapon turnis,

Kaj ŝtoniĝis vide:

Kvin geknaboj en angulo

Al li gapas side.

- Hej, edzinjo! – li ekkriis,

Plaŭdis per la manoj. –

- Kion tio ĉi signifas?

De kie l' infanoj?!

La edzinjo kun rideto,

Kvazaŭ fanfaronis:

- Ankaŭ ilin, kara edzo,


Dio al mi donis...

- Bona paĉjo! – l' viro diris, -

Ne vane mi gloris.

Sed, mi pensas, ke pri tio

Li ja tro laboris.



Taras Ševĉenko

En kazemato

Por mi egalas, ĉu mi restos
Aŭ foros de Ukraini'.
Ĉu oni tute min forgesos
Trans la fremduja neĝlini' -
Egalas tute do por mi.
Kreskinta en ekzilo fremda,

Mi, sen funebra plor' parenca
 Forpasos en la malliber',
 Kunprenos ĉion for de l' ter',
 Eĉ etan spuron ne lasinta
 En lando glora ukraina,
 En nia – ne en mia ter'.
 Kaj patro dum funebro mia
 Ne petos filon: "Preĝu, fil'
 Por li, pro land' Ukrainio
 Ekzekutita en ekzil'".
 Por mi egalas absolute,
 Ĉu l' filo preĝos poste pli,
 Sed ne egalas ja por mi,
 Se trompular' dormigos tute
 Ukrainjon, kaj en fajra bril'
 Ĝin, priŝtelitan, vekos krude...
 Oĥ, ne egalas ja por mi.

Ivan Franko

Virina koro! Ĉu glacio frida
 vi estas, aŭ printempa freŝa flor'?
 Ĉu lumo suna? Ĉu la flam' senbrida,
 voranta ĉion? Ĉu la elsonor'
 de l' sonĝoj ĉastaj? Ĉu la flag' batala,
 vokanta al la venko? El infer'
 satano aŭ anĝel' ĉiela, pala?
 Ĉu roz' aŭ dormo estas via ver'?
 Kio vin movas en la viva mar'?
 Al kiu preĝojn sendas via ĉarmo?
 Konstantas aŭ mensogas via klar'? –
 Somer' vi estas – fulmo kaj la varmo,
 eden', trovita en katena par';
 la ocean' – allogo kaj alarmo.



* * *

Oj vi, knabino, kerno de nukso,
 Kial do kor' via – pika arbusto?
 Kial pacama preĝ' – viaj lipetoj,

Sed viaj vortoj razklinge pretaj?

Kial misteras brilo okula,
Koron incitas ĝis flam' ekbrula?

Ho, la okuloj, la nokta fundo,
Vin rigardanto ne pensas pri l' suno!

Kial ridet' via – por mi sufero,
Tentas la koron per ŝtorma kolero?

Oj vi, knabino, stelo en disto!
Estas vi mia ĝoj' kaj mia tristo!

Ĉe vi la amo ne konas limon,
Sed pro la amo mi perdas animon.

Volodimir Sosjura



Tiel amis neni. Unikas en temp'
De la amo simila alveno.
Sur la Ter' tiutage disfloras printemp',
Kaj beliĝas la Ter' de l' mateno.

Ĝi etendas la manojn al stela etern',
Kaj facile paciĝas dum spiro...
Tiutage disfloras printemp' sur la Ter',
Kaj tremetas pro l' dolĉa sopiro...

Okulpara feliĉ' brilas nun en nebul'
Super mi, penetrante la koron...
Kaj la vejnojn reganta plensanga cirkul'
kvazaŭ herban posedas odoron...

Hej vi steloj brilantaj! Kviet' de la lun'!
Ĉu en mond' ies amo pli fortas?
Por ŝi mi, laborista poeto de l' jun',
Oron de Oriono alportos.

Tiel amis neni. Unikas en temp'
De la amo simila alveno.
Sur la Ter' tiutage disfloras printemp',
Kaj beliĝas la Ter' de l' mateno.

Ĝi etendas la manojn al stela etern',
Kaj facile paciĝas dum spiro...

Tiutage disfloras printemp' sur la Ter',
Kaj tremetas pro l' dolĉa sopiro...

El la rusa

Osip Mandelŝtam

* * *

Neesprimeblas la angor',
okulojn grandajn malferminta, -
vekiĝis la florbazo tinta
kaj sian lumon plaŭdis for.

La ĉambro plenas da arom'
de l' tristo – dolĉa kuracilo!
Ensbis tiom da trankvilo
la eta regno – mia dom'.

Iom da maja sunavid',
iom el densaj ruĝaj vinoj,
kaj la blankek' de l' mincaj fingroj,
rompanta l' mincon de biskvit'.



Iosif Brodskij

Stancoj al la urbo



Min protektu l' fortun'
kontraŭ mort' malproksime de vi,
en kolomba montar',
apud iu knabet' kurbokrura.
Vin protektu l' fortun',
ke ne vidu en nokta vizi'
miajn larmojn kaj veon
vi dum nuba forflugo obskura.

Rekviemu min do
ĥoro de la ĉiel' kaj de l'akv'.
Min brakumu l'granit',
kaŝu min
en momento konsterna.

Rekviemu min do,
benu min en rifuĝa forvag'
per la blanko de l' nokt'
via gloro senmova eterna.

Eksilentos la mond'.
Nur en mezo de l'vasta river'
krios nigra trenŝip' -
kontraŭ morn' batalanto senforta.
kaj flugante la nokt'
mian vivon en ties mizer'
nuptos kun via bel'
kaj kun mia praveco postmorta.

Robert Roĵdestvenskij

Unu el ni



Jen li por,
jen li por
trinko, manĝo,
dorm', labor',
por disiĝo
aŭ amor' –
kraĉas li
kaj ree – por.
Jen li por,
jen li por
ĉion perdi
el memor',
por atendi,
poste – por
tien-reen:
dom', labor'.
Vintro venas –
neĝa vest',
sed malplenas
la poŝtkest'.
Jen li por
oldiĝ', sopir',
razo, ĉespegula mir',
por sengasta

tag' post tag',
por senŝuldo,
senrepag',
por malŝato
al kinej',
por spektad'
el propra hejm':
trans fenestro
hunda lud' –
interese ja,
en tut'.
Jen li por,
jen li por
la tapiŝo –
flor' al flor' –
de la muro
ĝis la mur'
pura lano
kaj velur'.
Dio mia –
kia bel'!
... Pasintvintre
en malhel'
sen malsano,
sen dolor'
falis, mortis,
pasis for.
Tintis la
ĉeporda son':
jen duopo
kun la kron' –
memoraĵo sindikata
pri la vivo
griza, glata
sub ĉiela
griza strio...
Jen li por,
sed li – por kio?

Leonid Martinov



Pentrist'
la filinon ekpentris,
sed ŝi
forglitis de l'tol',
kvazaŭ luna radi'.

Ekpentris la filojn li,
sed – tutegal' –
aperis ĝarden'
kaj en ĝi – najtingal'.

Kaj kune amikoj ekkriis:
- En ver'
misteras por ni
via artmanier'!

Li trovis la solvon
por tiu problem':
Li tiam decidis
ekpentri sin mem.
Kaj venis la bildo
al taga medi'...
Kaj ĉiuj ekkriis:

- Ja ĝi estas ni!

Samuil Marŝak

Dormemo kaj oscedo



Pilgrimis laŭ vojeto
Dormemo kaj oscedo.
Dormemo l' nazon ŝovis
al ĉiu fenestreto,
penetris pordofendojn,
kaj tubojn de l' fajruj'
por diri al infanoj:
- Nu, enlitiĝu tuj!

Oscedo diris: – Kiu

tuj-tuj en liton iros, -
al tiu mi, Oscedo,
nur “ Bonan nokton!” diros.
Kaj vi post la admono
ne enlitiĝu, sed –
vin kaptos laŭ ordono
osced’, osced’, osced’...

David Samojlov

Dueto por violon’ kaj aldo

Mocart paŝis ebrieta
Al la hejm’.
En admiro malkvieta,
Fola plej.

Kaj la homojn gajokula
Ŝatis tre
Komponisto Mocart Wolfgang
Amade’


Sonoretis foliaro
De tili’.
“Tili-tiki, tara-tara”,-
pensis li.

Certe jes! Rutina bono -
Drinka vant’!
Sed – duet’ por violono
Kaj por ald’!

Sian arton li disdonas
Sen repag’.
Multajn sentojn li bezonas
Kun imag’!

Komponisto Mocart Wolfgang,
Lerta vir’ –
Donos, kion homoj volas,
Laŭ dezir’.

Ve! Enhejme plej verŝajne -
Draŝ’, incit’



Kaj tutcerte por, semajno –
Nigra frid’.

Sen ridet’ sen parolsono
Muta halt’.
Sed – duet’ por violono
Kaj por ald’.

Jes! Do estu lia pago
Sen protest’
Por ĝuinda gaja blago
En la fest’,

Por ebrio sen pardono,
Tutegal’!
Ja – duet’ por violono
Kaj por ald’!

El la jida

En geto

Marŝas en greg’ turmentata sklavar’
laŭ la sablo-vojo en morn’,
pasos en geto nun nia tagar’,
kaj niaj noktoj sen dorm’...



Daŭros la horoj pli pezaj ol plumb’,
minutoj de timo kaj kri’.
Petu, ke l’tagoj rapidu, kaj plu
la noktoj forflugu de ni.

Dormas neniuj, aŭdiĝas alvok’,
kaj falas teruro sur nin.
Se iun trafis la fato de l’nokt’,
estos li ties viktim’.

Time oftigās de l’koroj batad’
se nur ekknaretas la pord’.
Rodas paperon muset’ pro malsat’ –
kaj same ektremas la kor’.

Rulas paperojn enkorta venteg’,
kaj plu estingiĝas la viv’.
Tutfamilie senlingva la greg’ –

do estu benata nun vi.

Tiel ni kuŝas en timo kaj plag',
tretataj kun sklava humil' –
daŭras oprese sen fin' nia tag'
kaj daŭras la nokt' sen trankvil'.

Hej, klezmeroj

Hej, klezmeroj, miaj fratoj!
Dume restas ni en kun' -
Ludu por mi ĝojan kanton,
Miajn zorgojn prenu nun.

L' koro spiras tragedie,
Sed kun vi trankvilos ĝi.
Ion petas la animo, -
Kion do – ne scias mi.


Ludu, pelu kun impeto
Triston vi en mia kor',
Tiel kantis mia panjo,
Kaj forlasis min dolor'.

Festan kanton vi ekludu -
Kial nun sopiras vi?
Ploras tubo, ploras fluto,
Ĉio ploras ĉirkaŭ mi.

Hej, klezmeroj, miaj fratoj!
Dume restas ni en kun' -
Ludu por mi ĝojan kanton,
Miajn zorgojn prenu nun.



El la angla



Sun' ardas pli ol ŝia okulpar';
Pli ol la lipoj ruĝas la koral';
Similas draton ŝia nigra har',
Kaj ne similas neĝon brusta pal'.
Jen ruĝ' aŭ blanko de l'damaska roz' –

En ŝiaj vangoj mankas sama minc',
 Kaj ŝia varma spiro – jen la proz' –
 Ne kiel dolĉ-parfum' incitas min.
 Mi amas ŝian ridon, malgraŭ ke
 Muzika son' ĝuindas multe pli;
 Dum ir' ŝi teron tretas re kaj re –
 Ja, mi ne vidis kiel paŝas Di'.
 Sed venkas tiujn mia amatin',
 Kiuj pro falskomparoj trompas sin.



M. Bronŝtejn.
Mia bibliografio (nur libroj)

Jaro	Eldonisto	Eldonkvanto	Aŭtoro(j)	Titolo	Mia partopreno
1963	Zisman, Moskvo	100	mi	Cirko de bestoj	aŭtoro
1970	Коммунар, Тула	2500	multaj	Ветер времени	aŭtoro, p. 73-83
1982	E-klubo, Ufa	300	mi	Verda Ĝardeno (kantaro)	aŭtoro
1990	Progreso, Moskvo	1000	multaj mi Al. Puŝkin	Impeto-89: “Ke Puŝkin estu ankaŭ nia” “Graf’ Nulin”	aŭtoro, p. 133-134 traduko, p.134-

					142
1991	Progreso, Moskvo	1000	multaj mi Pasternak B.	Impeto-91 : “Tondru nia kant’ » «Homoj kaj situacioj»	aŭtoro, p.158- 163 traduko, p.171- 248
1992	Impeto, Moskvo	800	mi	Legendoj pri SEJM	aŭtoro
1993	Impeto, Moskvo	500	mi	Oni ne pafas en Jamburg	aŭtoro
1995	Impeto, Moskvo	1000	mi	Kantoj de Mikaelo Bronŝtejn	aŭtoro
1996	Impeto, Moskvo	500	Strugackij A.,B.	Pikniko ĉe vojrandoj	traduko
		500	Kim Joĉjo	Elevatora Seulo	traduko en la rusan
1997	Impeto, Moskvo	500	Strugackij A.,B.	La fora Ĉielarko	traduko, prefaco
1998	Impeto, Moskvo	500	A.,B. Strugackij	La dua invado de marsanoj	traduko, prefaco
		500	Puŝkin A.	Elektitaj verkoj	kompilo, prefaco, traduko – parte
		300	mi	Jen denove...	aŭtoro
		300	multaj	Lena	aŭtoro, p. 9,48- 50
		300	mi	Legendoj pri SEJM-2	aŭtoro
2000	Impeto, Moskvo	500	Puŝkin A.	Elektitaj verkoj- 2	kompilo, prefaco, traduko – parte
		500	mi	Mamutido Miĉjo	aŭtoro
2001	Impeto, Moskvo	500	mi	Mamutido Miĉjo-2	aŭtoro
		500	Brodskij I.	De nenie kun amo	kompilo, traduko – parte
	Kleks, Bielsko, Pollando	500	mi	Du lingvoj	aŭtoro
		300	multaj	Mondoj	aŭtoro – p.
2002	UEA, Rotterdam, Nederlando	500	Kolker B.	Vojaĝo en Esperanto-lando	aŭtoro – p.115- 117
	Ne indikita	?	Rublov S.	A.S. Puŝkin, tradukoj, vol.1	prefaco – p.4 – 15
2004	Peĉ. studija, T-n	500	mi	Dek tagoj de kap. Postnikov	aŭtoro
	Impeto, Moskvo	500	Strugackij A., B.	La loĝata insulo	traduko, prefaco

2005	Impeto, Moskvo	500	Strugackij A., B.	Lundo ekas sabate	traduko, prefaco
		300	mi	Iam, kiam...	aŭtoro
	UEA, Rotterdam, Nederlando	500	Kolker B.	Vojaĝo en Esperanto- lando	aŭtoro – p.115- 117
2006	Impeto, Moskvo	300	mi	Legendoj pri SEJM-3	aŭtoro
		400	Lukjanenko Sergej	La Nokta Patrolo-1, 2	redaktado
2007	Impeto, Moskvo	500	mi	Десять дней кап. Постникова	aŭtoro
		400	Lukjanenko Sergej	La Nokta Patrolo-3	redaktado
		300	multaj	Moskvaj sonoriloj	aŭtoro, p. 52-66
		500	Strugackij A., B.	Heliko sur deklivo	traduko, prefaco
		300	mi	Свою судьбу корить не смею	aŭtoro
2008	Impeto, Moskvo	300	multaj	El ombro	aŭtoro, p.23-44
		500	Varankin V.	Метрополитен	prefaco, redaktado
	Надстир'я, Луцьк, Ukrainio	250	Franko Ivan	Verkoj	traduko, p.9,17,18-24, 26-34,36,39-51
	Impeto, Moskvo	300	Lukjanec Dina	Tremanta stelo	kompilo, prefaco
2009	Impeto, Moskvo	500	Strugackij A., B.	La burgo kondamnita	traduko-parte, redaktado
		500	Lukjanenko Sergej	Kavaliroj de 40 insuloj	traduko, redaktado
		300	mi	Kajto	aŭtoro
		500	mi	Lecionoj por knabo	aŭtoro
	Kleks, Bielsko, Pollando	300	multaj	Verdeskaj pensoj	aŭtoro – p. 90- 92
2010	Impeto, Moskvo	500	Strugackij A., B.	Fabelo pri triopo	traduko, prefaco
		400	mi	Dek tagoj de kapitano Postnikov	aŭtoro
		400	mi	Urbo Goblinsk	aŭtoro
	E-eldonejo, Stokholmo, Svedio		multaj	Vizaĝoj	aŭtoro – p.19-31
	UEA, Rotterdam		multaj	La arto labori kune	aŭtoro – p.853- 856
2011	PRYMAT,	200	Gebirtig	Gehat hob ih a	traduko

	Bjalistoko, Pollando		Mordehaj	hejm Havis hejmon mi	
	Impeto, Moskvo	500	Brodskij Iosif	De nenie kun amo-2	kompilo, prefaco, traduko – parte
		400	Lukjanenko Sergej	Knabo kaj mallumo	traduko
		500	mi	Mamutido Miĉjo-3	aŭtoro
		500	mi	Pri Dinjo, Diko, k.a.	aŭtoro
		300	mi	Попрошусь я к вам в весну	aŭtoro
2012	Impeto, Moskvo	500	multaj	Min trafis feliĉ' esti...	traduko, prezentekstoj
		300	mi	Lecons pour un garçon	aŭtoro, tr. multaj
2013	Impeto, Moskvo	500	Strugackij A.,B.	Skarabo en formikejo	traduko, prefaco
	EXIT, Cluj- Napoca, Rumanio		Sigmond Julia	Dialogo	traduko rus. – p.66
2014	Impeto, Moskvo	300	mi	Kaj ekmatenos	aŭtoro
	Ŭonbulista centro Iksan, Koreio	200	-	Избранные песнопения уон-буддизма	Traduko, rus.
	E-centro, Stokholm, Svedio		multaj	Soka bostad i storstaden (svedlingva)	aŭtoro – p.23- 35,
2015	Impeto, Moskvo	300	mi	Mamutido Miĉjo-4	aŭtoro
2016		300	mi	Mi stelojn jungis al revado	aŭtoro
	Мг. Мосты, СПб	700	multaj	Мгинские мосты, альманах	aŭtoro, p.21-22
	ELI, Tel Aviv		multaj	Josef Ŝemer, memorlibro	aŭtoro p.79-80
2017	Impeto, Moskvo	300	mi	Sortoj frakasitaj	aŭtoro
	E-Centro, Pusan	100	mi	Oni ne pafas en Jamburg (korea)	aŭtoro, trad. Ombro
	EXIT, Cluj- Napoca, Rumanio		Sigmond Julia	Doloro	traduko rus. – p.66
2018	Impeto, Moskvo	200	mi	Lecionoj por knabo (2-a eldono)	aŭtoro
		200	Georgo Handzlik	Польские фрашки от	traduko,prefaco

				Георга Хандзлика	
	REU, Moskvo		K. Balmont	Mi venis al la mond'...	traduko, p. 51
	Melitopol- Jalta		multaj	Планета друзей	artikolo p.16-20
	EXIT, Cluj- Napoca, Rumanio		Sigmond Julia	Dankon	traduko, p. 63
	Mondial, Novjorko		Multaj	En la mondon venis nova lingvo	Artikolo, p. 466-472
2019	Impeto, Moskvo	200	mi	Viv-teatro	aŭtoro

Enhavo de registritaj diskoj



A. *Originalaj kantoj*

Iom da bono de Bruna Ŝtono (Kantas M. Bronštejn)
(Tihvin-2000, purigitaj elkasedaĵoj)

1. Ah, Moskvo...
2. Amata Lando
3. Amitaj, amataj, amotaj
4. Ĉinoj venas
5. Jen Vorkuta
6. Kanto de leganto
7. La adiaŭa
8. Letero de Gaston Bombon
9. Letero de Jukko Duopa
10. Mia nomo ne gravas...
11. Monologo en vendeja vico
12. Nin oldigas ne jaroj...
13. Novaj kondiĉoj
14. Oksikoko
15. Radikoj de l' dubo
16. Sezonoj
17. Subtera vivo
18. Terpomo
19. Tragedio de homo

20. Verda ĝardeno
21. Zimbabve

Esperantujo mia (Kantas M. Bronŝtejn)
(Tihvin-2003, sonstudio de la Arterlejo)

1. Mia nomo ne gravas...
2. Komencanto (poemo)
3. Novaj kondiĉoj
4. Letero de Leo de Bofron
5. Letero de Ludoviko
6. Valseto de Ŝlejer
7. Esperantujo mia
8. Civitana kanto
9. Enigmo
10. LKK-kantiko
11. Fabelo pri du sorĉejoj
12. Al la amikoj

Mia nomo ne gravas (N-ro 5 el la serio “Oraj kantoj” kantas M. Bronŝtejn, krom 2, 6, 10, 12, 15, 18)

(Tihvin-Moskvo-2004. Sonstudioj de la Arterlejo kaj de Igor Volodin)

1. Mia nomo ne gravas...
2. Novaj kondiĉoj (ensemble)
3. Kanto de leganto
4. Oksikoko
5. Tambura tango
6. Amazonka (ensemble)
7. Raĉikoj de l' dubo
8. Ah, Moskvo...
9. Ivanovo
10. Mi diras al ŝi (ensemble)
11. Gulĉataj
12. Amitaj, amataj, amotaj (ensemble)
13. Blanka nokto
14. Kvindeka vintro
15. Niaj trajnoj (ensemble)
16. Okazo dum la censo
17. Al la amikoj
18. La adiaŭa (ensemble)

Printempo blujinsa (Kantas M. Bronŝtejn krom 1, 4, 8, 15, 16)

(Tihvin-Moskvo-2006. Sonstudio de la Arterlejo)

1. Printempo blujinsa (T. Belova, V. Vlasova, M. Bronŝtejn)
2. Koketulinuoj
3. Alternativoj
4. Adieu, Paris (V. Vlasova, M. Bronŝtejn)
5. Vrako
6. Gajaj frapistoj
7. Mi estas kiel vi
8. Rimarkitaj (V. Vlasova, M. Bronŝtejn)
9. Pardonu, Aleksandro
10. Parolo de brito
11. Parolo de polo
12. Parolo de franco
13. Parolo de svedo
14. Parolo de ĉino
15. Blanka nokto (V. Vlasova, E. Sokolova)
16. Por Ĵomart (T. Belova, V. Vlasova, M. Bronŝtejn)

**La antaŭlasta trajno (Kantas M. Bronŝtejn kaj S. Straŝnenko)
(Riga-Moskvo-2012)**

1. Balado pri unu rastilo
2. Ĉetabla dialogo
3. Limerikoj
4. NIFo
5. Vivoj-ĉevaletoj
6. Kirlanta sort'
7. Ĉe la Espero (Aĥ, kompaninjo mia dolĉa...)
8. La virinoj kaj katoj
9. Elpensita amo
10. Diablidoj, kiuj estas en ni
11. Papilia aŭtuno
12. La flughaveno de Dusseldorf
13. La antaŭlasta trajno
14. Malamiko mia
15. Vi estas la amo
- 16.



Kantoj en aliaj orakantaj diskoj (ensemblo "Oraj kantoj")

1. Amata lando
2. Kanto de mulisto (N. Matvejeva)
3. Sezonoj
4. Turista kanto (Lennon-McCartney)
5. Zimbabve

B. Tradukitaj kantoj

**Gehat hob iĥ a hejm (Kantoj de M. Gebirtig, tradukoj de M. Bronŝtejn kantas Irena Urbanska)
(Poznano – 2009)**

1. La ora land'
2. La infanaj jaroj
3. Hej, Klezmeroj, miaj fratoj
4. Ekludu la kanton
5. Ludu, ludu, infanar'
6. Oj, mia panjet'

la KD-on eniras ankaŭ 6 kantoj en la jida lingvo

**Plenigu l'korojn je muzik' (Kantas M. Bronŝtejn kaj S. Straŝnenko)
(Riga – Sankt-Peterburgo-Moskvo – 2016)**

1. Plenigu l'korojn je muzik' (Ju. Vizbor)
2. La orgenisto (M. Anĉarov)
3. Kanto pri amiko (V. Visockij)
4. Renkontis mi ree l'Esperon... (B. Okuĝava)
5. La birdkaptanto (S. Nikitin – E. Bagrickij)
6. Sabro (A. Klmikov – S. Ŝĉennikov)
7. Preĝo (B. Okuĝava)
8. Majdan (S. Nikitin-V.Korotiĉ-Ju. Moric)
9. Atendo (V. Bondarenko)
10. Neĝo (A. Gorodnickij)

11. Vespero (T. Poĥlo)
12. Dombaj-valso (Ju. Vizbor)
13. Lama reĝo (A. Dulov-M.Karem-M. Kudinov)
14. Benata biero (G. Vasiljev – A. Ivaŝĉenko)
15. Glafira (G. Vasiljev – A. Ivaŝĉenko)

C. Partoprenaj KD-oj

Amu min (Kantoj de Ĵomart kaj Nataŝa, Tekstoj de M. Bronŝtejn)



1. Bonan vesperon
2. Reva vojaĝo
3. Ĝis
4. Amata
5. Pasis senzorga viv'
6. Moskvo
7. Kiam mi revenos
8. Min vokas iamo
9. Romanco
10. Stulta amo
11. En nekutime krispa mond'
12. Amu min
- 13.

Akceptu mondo nin amike (Kantoj de E. Puĥova, Tekstoj de M. Bronŝtejn)

1. Akceptu mondo nin amike
2. Kanteto en antikva stilo
3. Sinjorino Sopiro
4. Nu, ĝis...
5. Turmentoj en la rusa stilo
6. Tri princinoj



7. Vintra vesperigo
8. Adiaŭo
9. Edziniĝo
10. Du lingvoj
11. Feliĉas nia Dio
12. Verdaj karavanoj



//

CERBE kaj KORE
n-ro 9 (77), julio 2019

Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 105
BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
"RUSIA ESPERANTISTA UNIO"

**Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de
ĝusta indiko de la fonto**

Ckk atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al
Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 06.07.2019